# Komitatkunsido 05/09/25

# Partopreno

- Raymonde Coquisart, (RCo) ĉeestas
- Romain Curis (RCu) ĉeestas
- Pierre Gauthier, kasisto (PG) ĉeestas
- Pascal Hébert (PH) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar, prezidanto (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Viktoro Simonnet, vic-sekretario (VS) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ne ĉeestas

# Ekde la antaŭa komitatkunsido

La protokolo de la lasta komitatkunsido 27/06/25 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj
29/06, prezento de Esperanto al Mensa en Parizo, fare de PH, helpe de Julien Darrasse kaj FLJ, bone okazis. 10 partoprenantoj plenkreskuloj kaj poste kelkaj infanoj.
05/07, malfermo de nova centre socio-culturel, 133 rue Falguière, 75015, iris PH antaŭfine kaj AK?
12/07, Esperanta pikniko en Place des Vosges.
14/07, So Jinsu, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (KEA) kaj estrarano de UEA, prelegis pri kultura industrio kaj belarta merkato, en Koreio kaj en la mondo. Iris AK, PG, Yannick Bruneton (specialisto pri Koreio dum Mezepoko)
08/08, eta kafejo
En aŭgusto, membroj de la komitato, FLJ, AK, PG, VS partoprenis la UKn en Ĉeĥio. FLJ partoprenis IJK en Indonezio.

# Kursoj

- cours pour débutants en présentiel, mardi de 18h30 à 20h, PG, aliĝu al info@esperanto.paris ?
- cours intermédiaire en présentiel, mercredi de 18h30 à 20h, FLJ, aliĝu al francois@lojacomo.eu ?

Komence de septembro, la instruistoj rekontaktu la eksajn lernantojn por instigi realiĝi.
PG kuraĝigu kaj instigu siajn ekslernantojn al realîĝo por la venonta jaro, en pli altan nivelon.
Petoj de kurso:

- thiolotmichael @ gmail.com por la 2a nivelo, oni kontaktu lin
- iu nomita Boramy boramy.hay @ gmail.com kontaktis Said

La kursoj komenciĝos la 6an de oktobro.
Prezoj de la kursoj, por la tuta jaro, inkludante la kotizon al la asocio:

- normala prezo 109€ (kotizo 59€ + kurso 50€)
- malalta prezo por senimpostuloj 45€ (kotizo 20€ + kurso 25€)
- malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 40€ (kotizo 15€ + kurso 25€)

-> Korekti afiŝojn
Eblas reklami pri niaj kursoj per la urbodomo de Paris Centre:
- sendi mesaĝon antaŭ la 20a de septembro, por la monata dissendolisto
- alporti plurajn ekzemplerojn de afiŝetojn A5 por la "présentoirs" en la domo de asocioj (ene de la urbodomo)

# Varbaj eventoj en septembro

## Festo de asocioj en Paris Centre

Sabaton 06/09 10h-17h30 ĉe la urbodomo. Senpaga budo. Deĵoros : LPI, AL, VS.

## Homara festo / Fête de l'Huma

12-14/09, en Brétigny-sur-Orge. Prezo pagata de Espéranto France. Vilĉjo (la alia Guillaume) konsentas organizi kaj deĵori. Ideo : proponi prelegon pri Lucien Péraire (venontjare). Stand dans le village du livre, normalement il reste une table. À confirmer lundi. Matériel à préparer si confirmé, fixer un jour.
La Framadato estas https://framadate.org/XZTl9W14Ym39Vy75  ĉu sufiĉe plenas? VS petos Laurent Vignaud

## Malfermaj pordoj

Sabaton 27/09 14h-18h. Deĵoros : eble RCo, LPI., eble PG, RCu.
Eblaj agadoj dum la evento : ludoj, kvizoj, niveltestoj... Niveltesto disponeblas en edukado.net. kiu preparas ?
AL preparos afiŝon pri la malfermaj pordoj por la 2 antaŭaj varbaj eventoj kaj por afiŝi en la sidejo. Materialo troveblas en Edukado.net.
Por reklami la eventon, eblas enigi ĝin en vasta eventaro :

- Fête des possibles https://fete-des-possibles.org/ DJ

- Journée européenne des langues https://edl.ecml.at LPI
- dissendolisto aŭ afiŝtabuloj de Paris Centre, informiĝi ĉe festo de asocioj Ne plu eblas, necesas doni la informon antaŭ la 20a de la antaŭa monato

## L'espéranto en 60 minutes

Découverte gratuite de l'espéranto
03/10 19h en la sidejo. DJ gvidos kaj preparis afiŝon:
https://esperanto.paris/IMG/pdf/esperanto-60minutes-2025-a4.pdf
https://esperanto.paris/IMG/pdf/esperanto-60minutes-2025-a3.pdf

## Salon européen de l'Education

Okazos en Parizo 15-17/11. La prezo de budo estas alta, eĉ se oni marĉandas budon lastmomente. Espéranto France pretas pagi. VS prizorgos la aliĝon, PG organizos la deĵoradon. Kiu deĵoros : LPI, ...

# Bankokonto

Nia kasisto PG devas akiri aliron al nia bankokonto. Ankaŭ nia prezidanto devas subskribi dokumentojn por informi la bankon pri la ŝanĝo de leĝa reprezentanto, de la subskribantoj de ĉekoj kaj eĉ de la nomo de nia asocio (ne farita ekde 2014). Poste PG povos repagi elspezojn ekde la lasta ĜA se ekzistas. Li faros la donacojn al asocioj deciditaj dum la KK 28/03/25. Li pagos la asekuron ekde kiam li trovos asekurfirmaon.

# Asekuro

Espéranto Paris neniam havis propran asekuron. Ni malĝuste kredis ke la asekuro de Espéranto France ŝirmis nin. En 2023, Paul Quevy-Lefebvre, tiama kasisto de Espéranto France, informis nin ke ĝia asekura kontrakto ŝirmas nur la sidejon kiel lokon, kaj la eventojn organizitajn de la asocio. Neniu kontrakto ŝirmas niajn eventojn, ĉu en la sidejo, ĉu aliloke, eĉ se ĉiuj partoprenantoj estas ankaŭ membroj de Espéranto France. Necesas kontrakti asekuron por niaj eventoj. MAIF petas 385€/jaro, kio ŝajnas multe. Indus kompari kun la firmao de Espéranto France, kaj ties de aliaj Eo-asocioj kiuj tiom agadas kiel la nia, ekzemple Marsejlo (vidu KK protokolojn de 09/06/23 kaj 12/01/2024 en https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj ). Marc Gallardo respondis : " Esperanto Provence a 1 assurance en responsabilité civile qui lui a coûté 267,19 euros pour 2025. Assureur : credit mutuel ".

# Espéranto 94

Espéranto 94 oficiale donacis la restantajn librojn, la arkivojn kaj la materialojn al Espéranto-France. Xavier Godivier, prezidanto de Espéranto-France konsentas ricevi la donitaĵojn. Li ankaŭ pretas ricevi ideojn pri

donaco de libroj nevendeblaj. Espéranto-France proponos la arkivojn al la projekto pri arkivoj de Pascal Dubourg Glatigny, por ke ili havu la ŝancon esti profesie prizorgataj de Archives Nationales.
Espéranto 94 estas strebanta reakiri aliron al sia bankokonto. Kiam ĝi havos aliron, ĝi povos doni sian monon al asocio(j). Espéranto 94 organizos ĜAn en septembro aŭ oktobro por decidi kion fari per sia mono kaj oficialigi ĉiujn donacojn. Poste Espéranto 94 povos fermiĝi.
En la sidejo de Choisy-le-Roi, restas plena ŝranko de diversaj senvaloraj materialoj.
AL, prezidanto, devos skani multajn paĝojn da dokumentoj por sendi al la banko. Poste, kunsido de eksterordinara asembleo supozeble venontjare.

# Zamfesto

Prizorgas RCo. Organizota de 3 asocioj : Fervojistoj, SAT Amikaro kaj Francilia Federacio.
Okazos 13/12 14h30-17h30, en la salono de la fervojistoj : 17-19 rue Traversière, metroo Gare de Lyon.
Ĉiu asocio disponos inter 45' kaj 1h por la programo.
Sugestoj pri programo :

- Fervojistoj : Koruso, dancoj kaj eble poemo kiel pasintjare
- SAT Amikaro : Proverboj de Izabel. kaj eble iun teatran prezenton
- Francilia Federacio : muzikistoj kaj kantistinoj La Abeloj (viditaj kaj aprezitaj dum kongreso de Esperanto-France en Nantes 2025). RCo Kontaktis la Grupon La Abeloj, el Tours. Prezo = 588,72€.
- Eblos montri surekrane kelkminutajn filmetojn el nia Jutuba kanalo https://www.youtube.com/@EsperantoFrancilio Ĉu estas ekrano por projekcii en la salono?

SAT Amikaro : kutimo manĝi kune.... (malfacilas) .... En la fino, sugesto eble organizi aperitivon.
Francilia Federacio prizorgos bufedon dum la paŭzo. Prizorgos LPI, AK.
Fervojistoj prizorgos la lotumadon.
Venonta renkontiĝo la 20-an de Septembro je la 14-a en SAT-Amikaro antaŭ kurso de Elizabeto Barbay.
Partoprenos RCo

# Kongreso EO Fr 2028

RCo Ĉu interesus Francilian Federacion organizi la landan kongreson 2028?
FLJ Kongresi en Parizo estas bona ideo, tamen estas ĉiamaj malfacilaĵoj. Parizo estas multekosta urbo, estas malfacile trovi tie malmultekostan kongresejon kaj malmultekostajn tranoktejojn. Pli facilas en ĉirkaŭurboj.
Jam okazis kongreso en ĉirkaŭurbo de Parizo https://kongreso2017.esperanto-france.org/ sed necesis unu aŭ du horoj da veturado por atingi ĝin ekde Parizo.
RCo Prave sed estas urboj kiuj ne troviĝas je unu aŭ du horoj for de Parizo.
LPI jen eblaj lokoj ene de Parizo: https://www.cisp.fr/ kaj https://www.mije.com/auberge-jeunesse-paris
Rco kaj ankaŭ trovi skipon da helpantoj, sed mi ne dubas pri tio.
AK Ĉu RCo konsentus proponi loko(j)n kaj ĉeforganizi la kongreson nome de nia federacio?

# Agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: RCo ĉiumonate. Debora prizorgas salonon. Reta renkontiĝo dum Oktobro.
- Legoklubo: RCo ĉiumonate. Venonta evento dum Novembro.
- Babilrondoj posttagmezaj: RCo ĉiumonate venonta en oktobro
- Junularaj babilrondoj: Guillaume Demeyère (Vilĉjo) RCu, ĉiumonate
- Kontaktpersono pri ekzamenoj: FLJ. Pluraj specoj de ekzamenoj. Kontakti se petoj. 3-4 kandidatoj jare por FEI (okazos kunsido). Eblos proponi KER ekzamenon se sufiĉe da kandidatoj.
- Esperanto-kafejo: Cyrille Poullet kaj Ludivine Delnatte, ĉiumonate
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, AK, ĉiumonate. Venonta evento dum Oktobro.
- Prelegturneoj: FLJ, se denove EFr organizas.

Notu bone : post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart @ yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

# Projektoj

- Krei kolekton de vortokartoj por Anki: RCu AL FLJ
- Ordigi nian ŝrankon: AL PG il faut des taquets. PG alportos ilin.
- Trovi niajn ciferecajn arĥivojn, krei rubrikon en nia retejo (ekz. https://drive.google.com/drive/folders/0BzYR3Dikl31FdS1FMWZhWS1oems?resourcekey=0-Sowu9j9qewzYBKUECnYShA (nun estas en https://esperanto.paris/administrado): DJ LPI RCu
- Reordigi nian retejon PG, AK
- Krei filmetojn por la sociaj retoj kaj kanalo Youtube https://www.youtube.com/@EsperantoFrancilio : Régis Fournier, FLJ, LPI, RCu VS. Régis, LPI kaj Ava kreis filmeton pri muraj pentraĵoj, kiun Régis muntas. Jam estas kelkaj filmetoj. Ĉu publikigi en Youtube la filmetojn pri Peraire, pri Sonia Amariglio ? Régis proponas filmi pri "kiel interparoli". Komisiona renkontiĝo okazos post la reveno de Régis meze de oktobro.
- Paĝmarkiloj: AL, necesos mendi kiam ne plu restos da. Aldoni "CC by nc sa". Aldoni "esperanto.paris". Problemo de Lulu Testudo kiu vendas nian paĝmarkilon en la angla sen la permeso de Marianne Trintzius (https://esperantoworld.odoo.com/fr/shop/pagomontrilo-pagomarkilo-pagosigno-81), AL kontaktos ŝin.
- Ĉapeloj : DJ plimalpli 400€ por 100, petos prezon kaj skribos al komitato
- Subglasoj: PG les infos sont à demander à GVN, modelo sur Drive, kvanto petota
- Espéranto café croissant: dormanta
- Transfert pour t-shirt kun pariza urbolinio, simila al tiu de Montrealo dum la tiea UK (Peti de Lulu aŭ de hispano renkontita dum UK): PG
- Kit d'accueil du nouvel arrivant: AK. Ĉu pliaj dokumentoj ol *livret des membres* de Espéranto-France?
- Disdoni librojn al la onta multlingva biblioteko Livre Ensemble https://www.association-

livreensemble.fr/ : atendante ke ĝi malfermiĝu, LPI PH

- Kontakti la mezlernejojn pri la projekto MultLingva Akcelilo: dormanta
- Animation pour les habitants dans les cours d'école de Paris Centre le samedi: dormanta
- Disdoni librojn al publikaj bibliotekoj (detaloj en protokolo KK 22/03/24): dormanta
- Ministerio pri financaj aferoj: LPI, PG, nenio nova, dormanta
- Trovi kaj ordigi niajn paperajn arĥivojn, por doni al Archives Nationales: dormanta, demandi al Reĵis kiu prelegis kaj ekspoziciis dum la landa kongreso 2017
- Kunsido por novaj membroj, unufoje jare en novembro, je la 22/11 14h-16h, surloke kun kuketoj. RCo proponos invitilon. Ni festos **125an jariĝon de la pariza asocio** (samaĝa kiel la pariza metroo). Ni invitos ĉiujn. Eblos reklami per la tabeloj de Paris Centre, por tio necesas alporti al la domo de la asocioj (ene de la urbodomo) 13 ekzemplerojn de A3 afiŝo antaŭ la 20a de oktobro.

# Respondeculoj pri informkanaloj

Informi pri niaj eventoj. La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook VS https://www.facebook.com/esperanto.paris
- X PG https://twitter.com/esperanto_paris
- BlueSky PG https://bsky.app/profile/esperantoparis.bsky.social
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Telegramo AL RCu https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Vacapo: AK VS https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
- Instagramo AL kontaktos Lulu Testudo
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj VS necesas informi la antaŭan monaton

# Niaj retpoŝtadresoj (memore)

Adresoj kreitaj de nia federacio, administrataj de prezidanto kaj sekretario

- komitato-francilio@googlegroups.com, resendas al la komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com, resendas al la membroj aliĝintaj por la jaro 2024-2025 (mane ĝisdatigata 16/03/25 sed ne poste)

Adreso kreita de nia federacio

- amikaro-francilio@googlegroups.com, resendas al ĉiuj interesatoj pri niaj eventoj, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi

Adreso kreita de Espéranto-France, ne uzita

- francilio@esperanto-france.org, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi, vidu ĝian priskribon https://esperanto-france.org/sympa/info/francilio

Kontaktadreso de nia retejo esperanto.paris, la resendadon administras Emmanuelle Richard

- info@esperanto.paris, resendas al la estraranoj kaj Said Baluŝi

Por diskuti inter ni komitatanoj, ekzistas ankaŭ kanalo en Telegramo

- grupo Komitato Francilio en Telegramo

# Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 05/12/2025 19h30, mikse. VS prizorgos la retaliron. Ni parolos pri la Zamfesto, la Reĝkuko kaj la ĜA.

# FINO DE LA KK